

Carlos I. DE JESUS (n. 1923)

La legendo

“*Sur la tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero*”. – Genezo XI,1

La homidoj estis feliĉaj. Multaj generacioj estis jam forpasintaj depost la surteriĝo de Noao kaj liaj filoj. La akvoj de la diluvo jam delonge retiriĝis en la maron, kaj la grundo ĉie estis jam seka. Kampoj estis fekundaj. Pluvoj falis je la ĝusta tempo. Rikoltoj estis riĉaj. Pano abundis kaj laboro ne tro pezis. Pli feliĉiga ol ĉio: sur la tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.

Por la Noaidoj la vivo preterglitis trankvile. Komprenante unu la alian, ili ĉiam interagis kaj ne nutris multajn ambiciojn. Amikeco kaj bonvolemo, kiuj nature elvolviĝadis el tio, ke oni havas unu parolmanieron, regadis ĉie. Homoj kunlaboris, kunpreĝis, kunfestis, kunamuziĝis kaj konekzistis senmilite. Gentan jaluzon oni ne konis, ĉar gentoj ne ekzistis. Nur kunsento pleniĝis ĉies animon.

Tamen, estis poste tempo, kiam homoj venintaj el oriento, trovis en la lando Ŝinaro belan valon. Ili tie ekloĝis. Komence bonaj kaj saĝaj, ili ial estis poste ekposeditaj de senmezura ambicio: elstarigi al si gloron. Por tia celo ili decidis konstrui tie urbon kaj en ĝi turon, kies supro atingus la ĉielon. Ĉi tiu tasko estis ja neplenumebla. Ilia gloramono tamen blindigis ilin. Ili ne vidis ĝin nebla.

La laboro estis komencita. Oni alvokis arkitektojn kaj konstruistojn la plej spertajn. Unuj lerte ellaboris la planon de la turo, dum aliaj elknedis brikojn el argilo. Per fajro oni brulpretigis ilin laŭ la plej novaj metodoj. Multaj konstruoj konstruiĝis. Per bitumo oni ĉiutage alfiksas pliajn brikojn kaj la turo altiĝis rapide.

“Por kio oni konstruas turon tiel altan, fortikan kaj belan?”, demandis iuj simplaj popolanoj. “Neniu utilo venos el ĝi”.

Sed la plimulto estis fiera, kaj fiere fanfaronis responde:

“Per la konstruo de tiu ĉi turo, kies supro atingos la ĉielon, ni akiros al ni grandan gloron. Dio kaj homoj vidos, kiel potencaj ni estas, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵon de la tuta tero. Tra ĝi ni povos supreniri en la ĉielon kaj tie eksidi kamarade kun Dio. Ni estos kvazaŭ dioj, ĉar ni ne estos malhelpataj en ĉio, kion ni decidis fari”.

Paralele kun la kresko de la turo, ilia famo disvastiĝis tra la tero, ĉiam pli kaj pli malproksimen. Fine ĝi atingis la vilaĝon, kie loĝis Zamenho.

Zamenho estis simpla kaj bonkora junulo, kiu amis la vivon kaj estis tre amikema al ĉiuj homoj. Li fervore oferis longan tempon al la faciligo kaj malpezigo de la doloroj de la malsanuloj. Li lernis pri la kuracivaj virtoj de certaj herboj kaj aliaj vegetaĵoj. Li okupiĝis pri elkolektado de tiaj plantoj tra la kampoj, kaj eĉ kultivis kelkajn sur la agro apud sia domo. Post konvena preparado, li kutime sanigis per ili la suferantojn, kiuj kalkulis je liaj bonkoreco kaj scio por liberiĝi de ĉiaj malsanoj.

Nu, Zamenho aŭdis pri la konstruado de la turo en la urbo Babelo kaj tute maltrankviliĝis.

“Ĉu ili freneziĝis?”, li pensis en sia koro. “Ĉu ili ne vidas, kie tia tasko estas neebla? Ili tiel provokas la Dian koletron kaj esperas gloriĝi senpune. Tia senhonta kaj vanta pretendo atingi la ĉielon kaj tie ekregi kun la Ĉiopovulo certe altiros sur la homojn la plej abomenajn mizerojn”.

Li meditis en sia animo pri la punaj sekvoj, kaj lia intuicio diris al li, ke Dio konfuzos ilian lingvon, ke unu ne komprenu la parolon de la alia; ke, pro tiu motivo, el unu ekzistanta popolo fariĝos multaj popoloj. Tian grandan malfeliĉon oni neniam antaŭe vidis sur la tero.

Li faris sian decidon. Li rapidu al Babelo kaj, per flamaj paroloj, li konvinku la konstruistojn, ke ili haltigu la konstruon de la turo antaŭ ol la Eternulo konfuzos ilian lingvon. Li elokvente klarigu al la homoj pri la grandeco de la katastrofo, se multlingveco kaj multpopoleco supervenos. Li ekspliku pri la malpaco kaj reciproka malamo estigataj de nekompreniĝo; pri la sentoj de malsamgenteco kaŭzataj de malsamlingveco.

Li marŝadis al Babelo. Li ellaciĝis de la multtaga klopodego. La konstruo de la turo progresis pli rapide ol li povis iri. Lia animo urĝis lin, sed liaj fizikaj fortoj komencis cedi. Li timis, ke li maltrafos. Li eble malfruos. Sento de frustracio ekregis lin. Io flustris al li, ke eviti la katastrofon estas lia devo. Li estis ĝislime laca kaj, sub verdaj branĉoj, li ekdormis.

Zamenho sonĝis. Blanke vestita sendito de Dio aperis al li kaj diris:

“Vi maltrafis, Zamenho. La puna mano de la Sinjoro falis jam sur la malsaĝulojn. La Plejaltulo konfuzis jam ilian lingvon. Mil lingvojn ili nun parolas kaj ne komprenas sin plu. Ili malpaciĝos kaj foriĝos unu de la alia. Ili jam disiras sur la tero por ekposedi ĝin gente, tribe. Nenion vi povas fari nun. La homidoj devos elteni la abomenindaĵon dum jarmiloj”.

“Sed”, pluinformis la di-sendito, “ne ĉagreniĝu, Zamenho. Ĉio ne estas perdita. La Dia puno al la homoj daŭros jarmilojn, sed inter la estonte malproksimaj idoj de Noao troviĝos unu Abrahamo, kiu estos patro de multe da popoloj, kaj inter ties idaro nakiĝos tiu, kiu, el amo al la homaro, havos la talenton krei la unu lingvon, kiun la homidoj tiel preme bezonos. Komence multaj priridos lin. Li, tamen, tion superece ignoros kaj esperos, esperos... Li sin alnomos **Esperanto** .

Li entuziasme kantos, ke ‘en la mondon venis nova sento’, kaj tiu nova sento fariĝos tiel potenca, ke ĝia semo ne formortos, sed restos por ĉiam ĉe la Noaidoj, tiam feliĉiĝontaj danke al lia UNU LINGVO.”

Ralph A. LEWIN (n. 1921)

La Rulteksto de Rameh

[Oni trovis tiun ĉi tekston skribitan sur rulaĵo de aluminifolio, kiun oni ŝovis en malplenigitan konfitajĵpoton, kaj lasis sur breto en profunda kaverno meze de la dezertaj montetoj. Ni malvolvis ĝin kiel eble plej zorge. Estis malfacile legi la vortojn, skribitajn per antikvaj hebreaj literoj sen vokaloj. Tamen, ni opinias ke la jena traduko estas pli-malpli ĝusta.]

Mi nomiĝas Jozefo kaj posedas grandan bienon ĉe Rameh. Unu semajnfino, mi akompanis tri el miaj dungitoj transportantaj ĉareton plenan de niaj varoj por vendo en la centra merkato de Jerusalemo. Laŭvoje hejmen, ni renkontis popolamason ekster la urba murego, ĉe loko kiu nomiĝas Golvari. Ŝajne oni ĵus ekzekutis kelkajn ulojn. "Ĉi-okaze, kiuj estis enajligitaj" mi demandis. "Du ŝteletistoj kaj unu freneza popolinstiganta anarkiisto. Jen li, la barbulo en la mezo." (Tiam li jam estis apenaŭ rekonebla.) "Ho, mi ja konis lin" mi respondis. "Ne tiom malbona ulo, ĉu ne? Li eĉ proponis kelkajn bonajn ideojn" mi pensis. Tamen, oni rakontis al mi ke li kreis tiom da problemoj kaj matrankvilajoj por la aŭtoritatoj, ke tiuj ĉi demandis ĉu la lokaj hebreoj deziras aŭ ne reteni inter si tiaspecan anarkiiston sen respekto por la tradiciaj leĝaro kaj ordo. Do, tiel la afero finiĝis, kaj oni najligis lin sur krucon kune kun la aliaj.

"Kia domaĝo!" mi pensis. Mia opinio, li estis baze bona ulo. Tamen, tro malfruas nun: li estas jam morta. Sed kial lasi lin pendi tie supre, sub la varmega suno en la polvoplana aero, tagon post tago, dum elmanĝas lian korpon muŝoj, larvoj kaj korvoj, ĝis kiam ĝi falos teren (kio nepre okazos post kelka tempo)? Tial, mi disdonis al la romiaj soldatoj po ŝekelon kiel trinkmonon por persvadi ilin lasi sian gardan posteton dum du horoj. Poste mi ordonis al miaj laboristoj denajl-

igi la korpon de la barbulo kaj meti ĝin en nian malplenigitan ĉareton. Tiel ni kunprenis ĝin hejmen.

Reveninte ĉe mia bieno, mi ordonis ke oni enpuŝu la korpon en la ombran kaj malvarmetan tombon, kiun mi preparis por mi. Oni rulis ŝtonegon sur la enirejon, kaj tie lasis ĝin post la krepusko. Neniu vidis, kio okazis krom du virinoj, supozeble fervoruloj aŭ samideanoj de la barbulo, kiuj estis sekvintaj nin al Rameh. Postan frumatenton, mi ordonis ke la laboristoj fosu truon en la grundo ie proksime, kaj tien ili metis la korpon kaj kovris ĝin per tero ĝis preskaŭ nenio distingebilis. Poste ili repurigis mian tombon kaj rerulis la ŝtonegon kiel ŝtopilon. Se mi estas bonŝanca, mia tombo ne estos bezonata dum multaj jaroj.

Du tagojn poste, tiuj samaj virinoj revenis kun kelkaj samideanoj kaj ili denove elpuŝis la ŝtonegon, supozeble por elpreni kaj entombigi la korpon. Kiam ili konstatis ke ĝi ne plu troviĝas tie, ili ekkriis "Dio nia! Li malaperis! Eble oni iel desorĉis lin." Tiam ili freneziĝis kaj fabrikis ian historian klarigon, ion pri revivigo de la ulo kaj ties memaltiĝo al Paradizo, aŭ eble anĝeloj surportus lin tien.

Jen ĉio kion mi memoras pri la afero. Cetere, ni estas kutime multe okupataj pri bienaj laboroj ktp. Tamen, mi pensis ke estus inde skribeti pri la afero, kaze ke iu poste interesiĝus pri ĝi.

Adrian POPESCU (n. 1947)


La foririntoj

La foririntoj lastatempe promenas tra misteraj galerioj kvazaŭ tra sal-mino. Ĉu vi vidis en la blua nordo la danc-halon por ombroj kaj la spegul-salonon?

Kaj la kanapojn memorigantajn pri la romiaj litoj sur kiuj oni bankedis kaj la rondajn tabletojn surhavantajn vin-kruĉojn kaj pokalojn la virinajn bukojn kaj la ostan kombilon?

Sub la urbo etendiĝas silenta metropolo. L' artezaj putoj sur la placoj ensorbiĝas en la murmurantan fadenon de la naskiĝanta fonto kaj la bunta amaso en la niĉojn de la kolumbarioj.

Tradukis Ionel ONET



Doko (n. 1942)

La mondo de drakoj kaj gigantoj

Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigantoj en Azio, regis nian amatan Esperantujon la fama reĝo Rimo II "la Senvalora", kiu estis la antaŭulo de Kiko I "la Grandioza", (kiu atingis la tronon kaj la titolon "Grandioza" post kiam li savis la landon de la drakoj kaj de la gigantoj kaj de la najbaraj volapukistoj).

Tamen en la tempo de Rimo II "la Senvalora" la lando restis ankoraŭ ne savita, kaj la vivo ĝenerale estis mizera, kia ĝi kompreneble devus esti en mondo plena de drakoj kaj de gigantoj (kaj de volapukistoj).

Eĉ ankaŭ por la drakoj kaj la gigantoj la vivo estis mizera. Sangon soifantaj ili estis (kompreneble), sed en tiu antikva tempo bonan sangon oni malfacile trovis. Certe en Id-ujo ne bongustis la sango. En Solresolujlo malpli. Kaj verŝajne tute mankis sango al la loĝantaro de Klingonujo, en kies vejnoj fluis nur sengusta akvaĉo, maltaŭga por drakoj kaj gigantoj.

La sangon soifantaj drakojn kaj gigantojn do tre interesis la sango de niaj samlandanoj. Dolĉa (laŭdire) ĝi estis, kiel mielo. (Al drakoj kaj gigantoj kompreneble plaĉas mielo, ĉar al ĉiu plaĉas mielo.) Tamen la plej bona sango (laŭ la vidpunkto de drako aŭ de giganto) estas sango de belulino, kaj kompreneble la plej bela belulino laŭ la leĝoj de tiu fora antikva epoko nepre kaj malhazarda estis princino. Do la ĉefa deziro de ĉiu drako kaj giganto en la mondo estis viziti nian verdan landon, flari niajn verdajn florojn, vidi niajn verdajn vidindaĵojn, ĝui niajn buntajn popoldancojn, sed super ĉio viziti nian reĝan palacon kaj gustumi la soifatan sangon de ĉiu trovebla princino.

Pro tio kompreneble la reĝo Rimo II "la Senvalora" estis mizera. Sed kion fari? Je tago jam antaŭ prognozita de la reĝa astrologo kaj konfirmita de la reĝa sorĉisto, jes alvenis du spionoj el la landoj de la drakoj kaj la gigantoj, princinan sangon soifantaj.

Ili elŝipiĝis ĉe la haveno de la ĉefurbo, lacaj post longa vojaĝo en malgranda antikva ŝipeto sur kiu ili povis manĝi nur malbongustajn maristojn, sed ili pleniĝis je ĝojo antaŭ la glora kaj brila verdeco de nia kara lando. Post mallonga paŭzo en la havena kafejo por trinki kafon kaj manĝi kelnerinon, ili iris rekte al la hotelo por iom ripozigi sin.

"De kie vi venis?" demandis la akceptisto de la hotelo, kiu plenumis formularon.

"De Eŭropo kaj Azio", respondis la drako kaj la giganto.

"Kaj kio estas viaj profesioj?"

"Ni estas drako kaj giganto, sangon soifantaj", ili respondis.

"Kaj ĉu la vojaĝo estas faka aŭ feria?" demandis la akceptisto.

"Tion ni malfacile distingas. Ni venis por gustumi la sangon de verdaj princinoj, kiun ni aparte soifas".

"Feria, do", decidis la akceptisto.

"Ne nepre. Se ni sukcesos, kompreneble ni reiros hejmen

por verki turismajn librojn, kaj venos do multegaj aliaj drakoj kaj gigantoj en granda moda movado por sango-turismo". Tiel respondis la drako kaj la giganto.

"Do faka, tiuokaze", findecidis la akceptisto, kiu tiel skribis en la formularo.

En la hotelĉambro la du spionoj kalkulis kiel plej efike renkonti la princinojn kaj gustumi ties soifatan sangon, miele dolĉan. "Laŭ onidiro", diris la drako, "princinoj amas poezion".

"Certe ja ili amas poezion!" respondis la giganto. "Poezion amas ĉiu. Samkiel mielon!"

"Ni sendu al ŝi do poemon", diris la drako, "poemon tiel mirinde belan, ke ŝi tuj invitos nin al aŭdienco".

Tion decidinte, la du spionoj mendis ĉambroservon, manĝis la servistinon – "tute ne malbona", diris la giganto – kaj komencis verki poemon.

"Komencu per floroj", proponis la drako. "Bonaj poemoj temas pri floroj. Rop! rop! rop!" ("Rop! rop! rop!" estas la sono kiun faras drako feliĉe ekscitita.)

"Violoj estas bluaj; rozoj estas ruĝaj!" komencis la giganto. "Kio rimiĝas kun 'ruĝaj'?" li demandis.

"Nenio. Vi devos meti la rozojn unue, stultulo!" diris la drako.

"Rozoj estas ruĝaj; violoj estas bluaj! Jen! Kaj kio rimiĝas do kun 'bluaj'?" demandis la giganto.

"Ho, ekzistas abundaj rimoj", diris la drako:

Rozoj estas ruĝaj; violoj estas bluaj!

Kun via ruĝa sango estas ni kongruaj!

aŭ:

Proponu al ni sangon; ni venos la unuaj!

aŭ:

Ni estas nur draketoj, do ne terure bruaj!

"Sed mi ne estas drako!" plendis la giganto. Kaj ĉiuokaze la sango venas tro frue en la poemo. Tio ne estas subtila. Bona poezio devas esti subtila. Kaj plie, bona poeto ĉiam forlasas kelkajn substantivajn finaĵojn por montri ke temas pri poezio. Ho, kaj ĝi devas enhavi ankaŭ simbolojn. "Eŭ! eŭ!" diris la drako. ("Eŭ! eŭ!" estas esprimo de drakoj malfeliĉaj, kompreneble.) "Do, bone. Jen:"

Ruĝas la roz';

Bluas violoj!

Jen poemo, ne proz',

Kaj jen multaj simboloj!

"Sed", diris la giganto, "bonaj poetoj ankaŭ ofte interŝanĝas substantivojn kun adjektivoj. Ekzemple:"

Rozas la ruĝ'; violas la blu'!

Ne timigas nia muĝ',

sed nur la en viaj vejnoj posta sanga tru'!

"Eŭ! eŭ! eŭ! Vi estas la plej malbona poeto de la mondo!" kriis la drako.

"Eŭ! eŭ! eŭ!"

"Zijjj!" diris la gigantoj. (Gigantoj diras "Zijjj!", ĉu feliĉaj ĉu malfeliĉaj; ili estas iom malpli esprimivaj ol drakoj.)

Dum la du spionoj ŝvitis ankoraŭ super sia poezia alfabeto, la hotela akceptisto, kiu memkompreneble estis pli inteligenta ol li ŝajnis, raportis al la ĉefo de la reĝa polico, ke la urbon alvenis drako kaj giganto, sangon soifantaj, el foraj landoj, kaj ke aparte la sangon de la princino ili soifas. Kaj la ĉefo de la reĝa polico ĝuste tion raportis rekte al la reĝo Rimo II "la Senvalora", la antaŭulo de la reĝo Kuni I "la Grandioza", kiu estis savonta nian landon de la drakoj kaj de la gigantoj (kaj de la najbaraj volapukistoj).

"Drako kaj giganto?" demandis Rimo II "la Senvalora". "Ho ve! ve! ve!" li kriis. (Esperantujaj reĝoj malfeliĉaj neniam kriis "Eŭ! eŭ! eŭ!" Tiel sin esprimis nur drakoj.)

"Kion fari? Kion fari? Ho ve!

Venigu la saĝan Kuni; eble li savos nin de la drako kaj la giganto."

Intertempe en la hotelo la drako kaj la giganto daŭre strebis verki poemon por la princino, poemon tian, ke ŝi tuj ilin invitos al aŭdienco, kie ili povos gustumi ŝian soifatan sangon.

"Do jen!" diris la giganto:

Ruĝas rozaro; violaro nur bluaĉas!

Sang-similas ruĝa roz'; violo enuaĉas!

"Rop! rop! rop!" respondis la feliĉa drako. "Perfekte! Nu, ne! Atendu! Diable, ne! Vi mem enuas; la violo enu-ig-as vin! 'Enui' estas ne-transitiva! Eŭ! Eŭ!" ("Zijjj!" diris la giganto. "Ho zijjj! zijjj! zijjj!")

Post ankoraŭ du-tri horoj kaj multaj rekomencoj, ili fine estis pretaj por la aŭdienco – "Rop! rop!" diris la drako – kaj ili survojiĝis al la palaco, rigardante laŭvoje en la butikojn, ĝuante la belajn parkojn kaj la arkitekturajn vidindaĵojn de nia ĉiam verda ĉefurbo. Kompreneble ili manĝetis diversajn civitanojn laŭvoje, el kiuj ĉiu pli bongustis ol la surŝipaj maristoj, sed el kiuj egale neniu same dolĉis kiel mielo. ("Stulta onidiro", grumblis la giganto. "Zijjj!")

Atinginte la palacon, ili frapis ĉe la grandega verdega pordego. Respondis Kuni, la reĝa subulo, kiu estis savonta nian landon de la drakoj kaj de la gigantoj (kaj de la najbaraj volapukistoj). Kuni jam ĉion sciis pri la planoj de la du spionoj ĉar al li raportis ne nur la ĉefo de la reĝa polico, sed ankaŭ la reĝaj astrologo kaj sorĉisto. "Saluton!" li diris, ĝentile tamen ruze.

"Kiel mi povos vin helpi?"

"Ni venis kun poemo por la princino bela, kies sangon ni soifas", diris la drako. "Rop! rop! rop!" Kaj la giganto tuj komencis deklami:

Rozoj ja ruĝegas; violoj tamen ne!

Violoj nur bluaĉas. Ho ve! Ho ve! Ho ve!

Nin memorigas rozoj pri sango kaj miel';

Sed violoj nur bluozaĵ

Pli foras el ĉiel'!

"Haltu! Haltu!" kriis Kuni. "Mi ne povas toleri tion! Vi estas la malplej bonaj poetoj de la mondo! For! For!" Kaj tiam li fariĝis kolera ke, prenante sangon soifantan glavon kiu hazarde troviĝis ĉemane en la palaco, li forĉasis la drakon kaj la giganton ne nur el la reĝa palaco, sed el la ĉefurbo kaj eĉ el la tuta lando. Memevidente, la drako kaj la giganto, mem sangon soifantaj, neniam vidis antaŭe glavon egale soifan, kaj ege timis konstatante, ke ĝuste ilian propran sangon soifas la glavo. Rapide kuris ili ĝis la landlimo kun Volapukujo, time kriante "Eŭ! eŭ! eŭ!" kaj "Zijjj! zijjj!"

Kiam ĉiuj tri, Kuni kaj la drako kaj la giganto, fine atingis la landlimon, la ruza Kuni diris: "Do! Al mi mankas la forto ĉasi vin plu, eĉ malgraŭ tio, ke vi estas la malplej bonaj poetoj de la mondo. Tamen jen ni ĉe la landlimo kun Volapukujo. Ĉu vi sciis ke la sango de la volapukujanoj estas (laŭ onidiro) eĉ pli dolĉa ol la sango de eventualaj esperantujaj princinoj? Ĝis revido!"

La drako kaj la giganto okulumis unu al la alia kaj post iom da ripozo, komencis prove manĝi volapukujanojn. Bongustegaj ili estis (tamen iom grasaj kaj eble malbonaj por la koro samkiel ĉio bongusta). "Rop! rop! rop!" diris la drako. Kaj jen ekfiniĝis aĉa Volapukujo. Ĝuste tiel nian landon savis Kuni de la drakoj kaj de la gigantoj kaj de al najbaraj

volapukistoj. Nia reĝo Rimo II "la Senvalora", al kiu mankis kaj princo kaj princino, nomumis lin Reĝo Kuni I, "la Grandioza", savinto de nia lando. Kaj eĉ ĝis hodiaŭ neniu esperantuja poeto kuraĝas komenci poemon per rozoj kaj violoj.

La nomoj de la du spionoj restas kompreneble ankoraŭ en nia lingvo. Ĉiam la giganto esprimis sin per "zijjj" kaj la drako per "rop" kaj "eŭ". Do la antikvaj landoj (nun esperantujajn provincojn) de la gigantoj kaj de la drakoj oni nomas eĉ ĝis hodiaŭ A-zijjj-o kaj Eŭ-rop-o.

[Similaj rakontoj troveblas en *Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj mirindaj* de la sama aŭtoro. Kompreneble ĝi estas havebla de la Libroservo de ELNA.]



Alphonse ALLAIS (1855-1905):

Dio

Estis jam malfrue.

La festeno estis tre vigla.

La ĝojaj festantoj estis gajaj, bruaj kaj amemaj.

Meznoktas.

La dekdu horloĝbatoj sonas lante, grave, solene, kun tiu riproĉeco kiu karakterizas la malnovajn familiajn horloĝojn. Kvazaŭ dirante ke ili jam indikis multe da horoj por la malaperintaj antaŭuloj kaj multajn ankoraŭ ili indikos por viaj posteuloj, kiam vi estos malaperinta el ĉi mondo.

Senkonscie, la gajaj festantoj iom mallaŭtigis la bruon kaj la belaj junulinoj ĉesis ridadi.

Sed Albéric, la plej freneza inter ili, levis la pokalon kaj solene deklaris:

- Gesinjoroj, meznoktas. Alvenis la momento nei l' ekziston de Dio.

Frap, frap, frap!

Iu frapas je la pordo.

- Kiu estas tie?... Ni atendas neniun kaj la servistoj iris por kuŝiĝi.

Frap, frap, frap!

La pordo malfermiĝas kaj tra ĝi aperas la granda, arĝenteca barbo de altega oldulo vestita per longa, blanka albo.

- Kiu vi estas, homo?

L' oldulo respondis plejsimple:

- Mi es-

Je tiu junuloj sentitaj; tamen, nedubinde varma san-nove:


- Sed tio al vi mal-kun ni, ĉu?

Laŭ sia Dio akceptis la junulo kaj etoso rekre-

Ili drinkis, ridis kaj kantis denove.

La blua, matena krepusko malvidigis la stelojn kiam ili decidis disiĝi.

Antaŭ adiaŭi la gastigantojn, Dio rekonis, kun granda afablo, ke li ne ekzistas.



tas Dio.

deklaro, ĉiuj gegis sin iom ĝen-Albéric, al kiu ne mankis malgo, parolis de-

ne malpermesas plenigi glaseton

senfina boneco, la proponon de baldaŭ la antaŭa iĝis.

Tradukis de Ionel ONET

La nekonata belulino

Li estis vaganta sob, laŭ la Bulvardo Malesherbes kun manoj enpoŝe kaj pensoj aliloke, fore-for (eble eĉ sen pensoj), kiam subite, ĝuste antaŭ Saint-Augustin, li preterpasis virinon.

(Virinon junan, kies priskribo ne necesas ĉi-kaze. Provu imagi ŝin tia, kia ŝi plaĉus al vi, kaj vi estos entute en nia objektivo.)

Li salutis ŝin aŭtomatece.

Sed ŝi, ĉu ĉar ne rekonis nian amikon, ĉu ĉar ne rimarkis esti salutata, daŭre zorgis pri sia vojo, sen doni ian ajn eksteran signon de reciproka ĝentileco.

Kaj tamen, li diris al si mem, li estis jam vidinta ĉi virinon ie, sed diable kie? Kiacirkonstance?

Ĉiukaze, daŭrigis li, ŝi estas bela junulino, kun kiu oni ne enuus.

Post dudek pliaj paŝoj, obsedite, ne plu povante elteni, li turnis sin kaj eksekvis ŝin.

Ankaŭ de malantaŭe ŝi ŝajnis konata.

Kie diable li estis vidinta ŝin, kaj kiacirkonstance?

La juna virino eksoris laŭ la Bulvardo Malesherbes ĝis ties kruciĝo kun la Bulvardo Villiers.

Ŝi ekmarŝis laŭ la Bulvardo Villiers ĝis la Placo Trafalgar.

Tie ŝi turnis sin dekstren.

Dum li, sekvante ŝin, diris al si:

“Amuza afero, kvazaŭ mi revenus hejmen.”

Ĉiel, li daŭre ne memoris kie diable li estis vidinta ĉi junan virinon, kaj kiacirkonstance.

Alveninte antaŭ la domon numero 21 sur la Strato Albert-Tartempion, la sinjorino eniris.

Nu jen ŝi eniranta lian propran domon!

La ino eniris la lifton.

Sorsaltante po kvar ŝtupojn li ekis laŭ la ŝtuparo.

La lifto haltis ĉe la kvara etaĝo, lia etaĝo.

Kaj la sinjorino, anstataŭ sonorigi, elprenis ŝlosilon el la mansaketo kaj malŝlosis la pordon.

Bele vestita ŝtelistino, sendube.

Per unu salto li estis apud ŝi.

- Nu jen, ekparolis la nekonata belulino, vi sukcesas hejmenveni frue unu vesperon!

Nur tiumomente li memoris kie diable li estis vidinta ĉi inon, kaj kiacirkonstance.

Ŝi estis lia edzino.



Walt WHITMAN (1819-1892)

Mi aŭdas Usonon kanti

Mi aŭdas Usonon kanti, la diversajn karolojn mi aŭdas,
 Tiujn de meĥanistoj, ĉiu kantanta la sian, tian kia ĝi devus esti, gajan kaj fortan,
 La ĉarpentiston kanti la sian, dum li mezuras sian tabulon aŭ trabon,
 La masoniston kanti la sian, dum li pretiĝas por la laboro aŭ ĉesigas la laboron,
 La boatiston kanti tion, kio apartenas al li en lia boato, la helpiston kanti sur la vaporboata ferdeko,
 La ŝuiston kanti dum li sidas sur sia benko, la ĉapeliston kanti dum li staras,
 La kanton de la arbohakisto, tiun de la juna plugisto survoje matene aŭ je la tagmeza paŭzo aŭ je sunsubiĝo,
 La delican kantadon de la patrino, aŭ de la juna edzino laboranta, aŭ de la knabino kudranta aŭ lavanta,
 Ĉiun kanti tion, kio apartenas al li aŭ ŝi kaj al neniu alia,
 Tage tion, kio apartenas al la tago – nokte la aron da junuloj fortikaj, amikaj,
 Kantantaj per malfermitaj buŝoj siajn fortajn, melodiajn kantojn.

Tradukis Maurice WITTENBERG

Morton MARCUS (n. 1936)

Turistoj

En ĉi tiu lando ĉio malriĉas. La homoj premis siajn dorsojn en humilecajn pozojn kaj grimpas el fendetoj almozante manĝaĵon.

Ni proponis al ili monerojn, kiujn ili tuj manĝis senkonsciaj pri siaj rompiĝantaj dentoj. Ni proponis al ili niajn koltukojn kaj ĉapelojn, finfine niajn ŝlosiloĉenojn, fiksrigardante dum ili formanĝis ĉiun.

Finfine ni forrompis rokplatojn, kiujn manĝis iuj, dum aliaj ekmordetis niajn pantalonokrurumojn aŭ eketendis siajn malsekajn langojn laŭlonge de niaj jakomanikoj.

Ni manĝigis al ili niajn vortojn, plenajn frazojn, alineojn, kaj ankoraŭ ili manĝadis. Kiam ni turniĝis, ni trovis ke ili estis manĝintaj nian aŭtomobilon, kiu kuŝis sur flanko kiel bovinoskeleto.

Post kiam ili manĝis niajn vestojn, la pli sveltaj de nia grupo povis eskapi: ni kuris nudaj inter ili kaj ektordis radikojn kaj ekmaĉis furioze.

Poste ni memoris ke niaj pasportoj estis en niaj poŝoj, kaj la landlimgardistoj rifuzis al ni paspermeson.

Nun ni kaŭras ĉe la neĝbordo, turistojn atendante; sed kiam ili alvenas, ili nur ĵetas monerojn. Ni volas al ili diri kiuj ni estas kaj, kiam neniu vidas, klopodi ekpreni iliajn manojn, kiujn ili rapide retiras.

Ni ne perdis esperon, sed ĉiutage ni pli malsatas, kaj ĉiu konfesis povi senti odoron de turistoj horojn antaŭ ol ili alvenas.

Tradukis Miko SLOPER

Andrei CODRESCU (n. 1946)

Dulingva

Mi parolas du lingvojn. Mi lernis unu el ili en tranco, tute senkiale, dum tre mallonga tempo, sur ĉevalo, per ekvidoj, inter silentaj ribeloj. Unu estas la lingvo de mia naskiĝo, parolilo kiu pli-malpli enhavas mian menson racian, ĉar per tiu lingvo mi trovas min kalkuli monerojn en la vendejo kaj ordigi miajn poemojn eldonitajn. Iusence tiuj ĉi du lingvoj estas miaj privataj tago kaj nokto, ĉar tio kion oni scias senstude estas tago plena de lumo kaj premisoj maldelikataj. La lingvo de la nokto estas fraĝila; ĝi dependas plejparte de memoro, kaj memoro estas vasta folio blanka sur kiu skribiĝas la plej absurdaj esprimoj. La akiritan lingvon konstante gvas mia denaska lingvo kiel prizonulon en kaĝo. Lastatempe tiu nova lingvo planas eskapon kiun mi tute apogas. Ĝi planas fuĝi noktmeze kun la plejparto de mia menso kaj neniam reveni. Tiu ĉi skribaĵo estas parto de la plano: dum la denaska lingvo komencas (ĝuste nun!) traduki ĝin, granda bloko de mia menso jam disiĝis kaj ŝvebas en spaco tute libere...

Tradukis Miko SLOPER

Howard HAMMOND (n. 1956)

La Coharo

Jud-kabala legendo pri la Unua Lumo

“Rakontu pri la coharo, Avo!” petis la knabeto.

“Jes, jes! La coharo!” kriis la aliaj geknaboj.


“La coharo? Ho, geinfanoj, kiel vi divenis, ke tio estas unu el miaj plej amataj rakontoj?”

Nu, ni komencu... Estis antaŭ multaj, multaj jaroj, eĉ jarmiloj... La Plej-Superulo, beniĝu Li, faris la unuan lumon... ne la lumon de la Suno, de la Luno, de la astroj. Kiel ĉio en tiu pra-pra-tempo, ĉi tiu lumo estis pli simpla, pli pura, pli penetra, pli brila. Per ĉi tiu lumo, Adamo kaj Eva kapablis vidi ĝis la fino de la Tero kaj ĝis la fino de la Tempo. La lumo estis mirindaĵo, kiel ĉio en tiu antaŭlonga mondo. Ĉar Adamo kaj Eva ĉiam havis la specialan lumon kiam ajn ili deziris ĝin, ili facile forgesis ĝian valoron kaj baldaŭ subtaksis ĝian povon.

Poste, post kiam Adamo kaj Eva manĝis la malpermesitan frukton, Dio, benu Lian justecon, forpelis ilin de la Ĝardeno. Tamen, la Plej-Kompatulo donacis al ili iun brilegan ŝtonon por rememorigi Adamon kaj Evan pri tio, kion ili perdis. La Ĉio-Povulo metis iom da tiu speciala lumo en la ŝtonon, kio kaŭzis la juvelon brilegi. Adamo, kiu nomis ĉion kaj ĉiun, nomis la ŝtonon ‘Coharo’.

Adamo dis la Comemori la transdonis filoj, kiuj donis ĝin al ktp. Fin-Salomono Coharon ĝin en la ĝi brilegis kaj Eva ghararon por Ĝardenon. Ili ĝin al siaj gesiavice transsaj gefiloj fine, Reĝo heredis la kaj pendigis Templo, kie por ĉiuj. Bedaŭrinde, post la unua detruo de la Templo, la Coharo perdiĝis. Tamen, oni ankoraŭ diras, ke je momentoj de plej urĝa bezono, la Coharo troviĝas por memorigi nin pri la brileco kaj beleco de la Ĝardeno. Kaj tiam, baninte sin en la pac-dona kaj refreŝiga lumo de la ŝtono, oni tuj zorge rekaŝas la Coharon por estontaj generacioj... Tiamaniere la viv-memorero pri la Edeno neniam perdiĝos, eĉ dum la plej malfacila tempo...

Iam en la estonteco oni rekreos Edenon sur la Tero. Tiam oni ne plu bezonos la Coharon por rememori la belecon de la unua Ĝardeno, ĉar ni ĉiuj estos loĝantoj de la dua. Sed ĉi-foje oni ne subtaksu la valoron kaj povon de la Unua Lumo, farita por ni ĉiuj antaŭ multaj jarmiloj de la Kreinto, beniĝu Li! Ĉi-foje oni lernu el la eraro. Ĉi-foje oni daŭre loĝu la Ĝardenon!”



Fableto por la jaro 2000

Iam, karaj geinfanoj, la granda monstro Timo traflugis super la Tero. Oni povis tuj rekoni ĝin pro ĝia fi-magia efekto. Ekzemple, homoj ĝoje ridinte sub la suno subite silentis kaj kaŭris sub la ombro de Timo. Iliaj vizaĝoj, antaŭe feliĉaj kaj ŝercemaj, nun gvatis malbonon, suferon, morton. Neniu povis rekte vidi Timon, ĉar ĝi estis nevidebla. Oni povis nur senti ĝian ĉeeston, tiam kaŝi sin, kaj finfine maltrankvile atendi ĝian foreston. Malgraŭ ĉio, maleblas lukti kontraŭ nevidebla malamiko.

Vidu, miaj gefiloj, vi mem kuŝante en via ĉambro, jen kaj jen dumnokte subite eksentas, ke iu monstro, sub la lito aŭ en la vestoŝranko, aŭskultas vian spiradon. Kaj tiam vi silente, senmove atendas la tagiĝon. Sed ĉiumomente via maltrankvilo pligrandiĝas, kaj vi daŭre demandas vin: “Ĉu io ne susuris? Ĉi io ne moviĝis?” Simile, plenkreskuloj atendas la tagiĝon, sed pli longe ol unu nokton...

Do, por reveni al nia rakonto, gekaruloj: Timo traflugis ĉien, de ĉie, per siaj grandegaj, nevideblaj flugiloj, kun siaj akraj ungegoj. Finfine la landestroj de iu lando komenci timadi. Ili timadis la najbaran landon: “Ĉu io ne susuris? Ĉu io ne moviĝis? Ĉu ties ŝajne amikema vizaĝo ne kaŝas malamikecon? Ĉu ties donaco ne enhavas bombon? Ĉu ni ne preparu nin? Ĉu ni ne protektu nin?” Do, ĉi tiu timanta lando komenci faradi eksperimentojn, nukleajn eksplodojn sub la tero.

Unu post alia, la eksplodoj vundis la teron, tremigis la teron. Kaj la tertremoj finfine atingis la najbaran landon, kies landestroj antaŭe havis amikemajn vizaĝojn. Nun la monstro Timo flugis tien kun sia terura ombrego. Kaj, miaj atentuloj, la ektimantaj landestroj de la najbara lando komencis demandi sin: “Ĉu io ne susuris? Ĉu io ne moviĝis? Ĉu ties ŝajne amikema vizaĝo ne kaŝas malmikecon? Ĉu ties donaco ne enhavas bombon? Ĉu ni ne preparu nin? Ĉu ni ne protektu nin?” Do, ankaŭ tiu lando komencis faradi eksperimentojn, nukleajn eksplodojn sub la tero.

Unu post alia, la eksplodoj denove vundis la teron, tremigis la teron. Finfine, la Tero ne plu povis toleri la stultajn eksperimentojn de la timplena homaro. Finfine, la Tero ekkoleregis kontraŭ la tro memfida homaro. Finfine, la Tero montris sian superan povon rilate al la kompatinda homaro.

Unu post alia, tertremegoj, tertremoj, tertremetoj okazis. Ĉiu lando suferis de la sama katastrofo. Kaj neniu lando povis kontraŭstari la justan Teron. La teruro daŭris tutan semajnon ĉie en la mondo.

Je la fino, la monstro Timo ne plu ĝenis la homaron. Neniu plu ekzistis por senti ĝian ĉeeston. Oni ne plu gvatis malbonon, morton. Oni estis silenta, senmova. Je la fino, ankaŭ la granda monstro Timo, nevidebla, mem estis venkita. Neniu plu atendis la tagiĝon.

Mihail ĴVANECKIJ (n. 1934)

Abstrakta pensado (Familia leciono de aritmetiko)

– Vi havis du pomojn. Mi forĵetis unun. Kiom restas ĉe vi?
– Oj, paĉjo, oj...
– Vi havis du pomojn. Mi tranĉis unun je pecoj. Kiom restas ĉe vi?
– Oj, paĉjo, oj...
– Vi havis du pomojn. Unun mi voris. Mi voris unun. Kiom restas ĉe vi?
– Oj, oj, oj...
– Vi tenis en viaj malpuraj manoj du nelavitajn pomojn. Mi aliris, elŝiris de vi unun kaj voris ĝin. Kiom restas ĉe vi?
– Oj, oj...
– Ne! Necesas!... Vi havis du pomojn. Mi elŝiris kaj distretis unun. Unun el la du mi distretis per la piedoj. Kiom restas ĉe vi?
– Oj, oj...
– Lasu la infanon. Li estas idioto!...
– Mi ŝanĝas la kondiĉojn. Vi havis du pomojn. Unun voris vi! Vi mem voris unun. Kiom da pomoj, idioto, nun restas ĉe vi?
– Oj, oj, ne batu min...
– Neniu zooĝardeno! Neniuj gastoj! Vi neniam festos la naskiĝtagon! Mian tutan ferion mi pasigos kun tiu ĉi idioto. Vi havis du pomojn. – Zina, ĉu ni havas pomojn? Kion do vi havas? Bone, alportu karotojn. – Vi havis du karotojn, ĉi filo de hundino, mi forprenas... Redonu, redonu, idioto, tio ĉi estas aritmetiko!... Mi forprenas kaj voras unun. Jen, rigardu: mi voras...
– Gregĉjo, ĝi estas nelavita.
– Ne gravas. Li vidu. Mi voris unu karoton kun la grundo.

Kiom da karotoj restas ĉe vi?
– Oj, oj...
– Rigardu, kiom da malpuraj karotoj restas en viaj nelavitaj manoj?
– U-unu...
– Ĝuste! Kaj nun revenu ni al la pomoj!
– Oj, oj...
– Ne ploraĉu! Nur respondu! Vi havis du pomojn...
– Gregĉjo, li povas misgluti...
– Necesas! Tiu ĉi idioto respondis pri la karotoj ĝuste, do restas iom da espero. Tio ĉi evoluigas lian abstraktan pensadon. Vi havis du pomojn...
– Gregĉjo, mi admonas vin...
– Aŭ li ne estu idioto, aŭ li ne elkresku entute! – Vi havis du pomojn... Silento! La tuta domo mutu! Mi, via paĉjo, forprenas de vi...
La kriado iĝis tia, ke la najbaroj desupre ekfrapis la plankon.
– Nu bone, vi mem donas al mi unun. Kiom da pomoj restas ĉe vi?
– U-unu.
– Do, kiom da pomoj mi havas?
– Unu.
– Kaj kiom da pomoj vi havas?
– Unu.
– Ni manĝu ilin!
– M-manĝu...
Tamen pomoj ne estas. Nenio por manĝi troviĝas entute. Ĝuste tio ĉi nomiĝas abstrakta pensado!

Niaj uloj en Davos (Rusio negocas en Svislanda urbeto)

– Komprenu, de la evoluintaj landoj ni bezonas ne helpon, sed partnerecon. Mi ekspliku kiel ĝi funkcias. Vi donas al ni monon – kaj ni egalrajte partoprenas. Tio estas, ni esprimas nian vidpunkton pri niaj problemoj. Ĝuste kiel en tiu ĉi restoracio: ni invitis vin – vi pagas. Sed ni ne lasas vin sen atento kaj sen niaj konsultoj. Ĉi-kampe niaj scioj kaj sperto estas valoregaj, ĉar ni ja loĝas tie. Ĝuste tiel montriĝas la malfermiteco de nia ekonomio nun. Jes, hodiaŭ ni regalas vin je via mono kaj ankaŭ per via manĝaĵo. Sed vi ricevas de ni ion pli valoran – la analizon de la hodiaŭa situacio kaj, se tiel diri, eĉ la prognozon.

Kaj plue: ni preferas tiatipan helpon, kiu poste kaŭzas la sekvan helpon. Do, temas fakte pri apogo, kiun vi povus fari por ni – kaj pro tio evidente necesas konkurenci kun aliaj landoj. Mi substrekas ankoraŭfoje, en tio montriĝas la malfermiteco de nia ekonomio, kaj – por diri eĉ pli klare – ĝia esenco. Alivorte, tiuj unuaj kotizoj, kiujn ni ricevas de vi por la

rajto doni al ni helpon, estas nenio kompare kun la mono kaj la konkurenco por tiu ĉi rajto helpi al ni, kiu disvolviĝos post 3–4 jaroj. Ja ni povas preni de vi ĉion, kaj niaj eblecoj estas nelimititaj! Ni prenos de vi kinofilmojn, televid-programojn kaj tele-ludojn, replikojn “Restu kun ni”, ŝelkojn de teleĵurnalistoj, kaj aldone ni prenos de vi monon por realigi ĉion tion. Kaj tio estas nur la komenco.


Sed pro la rajto helpi al ni vi devos batali, plejparte kontraŭ nin mem ĉe la komenco. Nia *mentality*... (vi vidas – ankaŭ ĉi-vorton ni pruntis de vi), do nia mens... pensotradicio permesas al ni uzi vian helpon nur kondiĉe ke vi akceptas niajn malbenojn je via adreso kun danko!

Ni akuzas vin pri komploto, rifuzas viziojn, donas neniujn rajtojn kaj lasas kontraŭstari kuglojn de la krimuloj – por atingi la bilancon de intereso kaj ekvilibriĝi vian helpon! Ĉu vi sekvas min? Ĝuste tio ĉi estos la stimulo, kiu puŝos vin al nia merkato.

Kaj nia merkato estas vastega – nia vera fiero! Eĉ ne eblas imagi, kio por ni ne estas bezonata hodiaŭ. Ajna najlo, rompitaĵoj, krom-produktoj de via paper-manĝ-industrio. Mi ne misparolis, manĝaĵo, eble el papero. Kaj ĉio tio kun la priservo, rezervaj detaloj kaj garantioj.

Ĉi tio koncernas la grandajn urbojn. Rilate al la provinco... Tie oni ĝojos eĉ se vi simple vojaĝos al ili iam aŭtune. En ajna veturilo. Tio estos neforgesebla kaj por vi kaj por ili.

Tial alveturigu monon, maŝinojn, manĝaĵojn. Por repago de via flanko ni postulas nur jenon: akcepti nin en la Konsilion de la Evoluintaj Landoj, en la Parizan Klubon kaj en la Pac-prizorgan Procezon.



Kaj konsiderante kiom da eblecoj ni disponigas al vi, ni rajtas postuli, ke NATO dum sia kresko ne proksimiĝu al niaj limoj. Alivorte, ke ĝi kresku mal-kreskante. Ĉi tie mi jam tuŝas la militan doktrinon... Certe, vi devas ebligi ke ni minacu vin, kaj eble eĉ ke ni unuaj faru nuklean atakon – se dank' al via helpo ni sukcesos en nia restaŭrado atingi tian nivelon (ankaŭ je kio ni rajtas esperi).

Tamen la proponata de ni bilanco de reciprokaj interesoj estos atingita nur se vi ne perverte sed envere investos monon en nian milit-strategian komplekson tiel, ke ni povu unuaj fari nuklean atakon.

Ne pre subitan – tio estas nia kondiĉo. Tamen kun via antaŭpago.

Tradukis Aleksandro GOFEN

Anna BENNETT (n. 1950)

Dankofesta vojaĝo

Antaŭ kelkaj jaroj mia edzo kaj mi decidis vojaĝi dum du monatoj, kaj mia patrino konsentis prizorgi niajn du gefilojn. Do mi nur devis demandi al parencoj tra Eŭropo, ĉu ni rajtos viziti ilin kaj kelktempe gastigi ĉe ili. Ĉar ni jam estis irontaj al Eŭropo, ni decidis vojaĝi iom ankaŭ en Maroko. Mi skribis al mia fratino, kiu tiam loĝis en Rabat, kaj demandis ĉu tio konvenos al ŝi kaj ŝia familio. Ŝi tuj respondis; sed kompreneble mi ricevis ŝian leteron nur post kelkaj semajnoj. Ŝi skribis, ke ni estos bonvenaj kaj demandis, ĉu ĉagrenos nin se ni ne dankofestos. Mi tute forgesis, ke dum la tempo, kiam ni proponas viziti ilin, okazos la usona dankofesto. Ŝi plue skribis, ke ili ne dankofestos, ĉar ili vojaĝos dum tri tagoj tra la dezerto – sur kameloj! Ĉu ni volos partopreni tian travivaĵon kun ili?

Post kelktaga vizito ĉe mia onklino en Grenoble (en Francio), ni alvenis en Maroko. Kia kontrasto inter Francio kaj Maroko! Ni vizitis la antikvan urbeton Fez, kie en la malnova parto oni povas nur piediri ĉar multaj stratoj estas tro mallarĝaj por eĉ la plej malgranda aŭto. Kelkfoje ni devis premi nin kontraŭ muroj, kiam trapasis azenoj portantaj ankoraŭ malsekajn felojn, kiuj estis antaŭ nelonge tanitaj.

La tago por la kamela aventuro fine alvenis. Ni aŭte veturis al flughaveno, kaj post flugo al la suda parto de Maroko, ni veturis per taksioj kvar horojn ĝis la Sahara dezerto. Tie ni renkontis la berberojn kaj iliajn kamelojn. Unue ili surmetis niajn vestaĵojn kaj aliajn pakajojn sur la kamelojn, kaj ankaŭ lankovrilojn sur la ĝibojn de la kameloj. Poste la berberoj montris al ni kiel surmeti la longajn blankajn tukojn ĉirkaŭ la kapon. Fine ili helpis nin surgrimpigi la kamelojn ĝis supre de la lankovriloj. Eĉ pli interese estis tenadi sin dum la kameloj stariĝis desur la genuoj.

Dum kelkaj horoj la kameloj marŝis dum la berberoj piedirante gvidis ilin kaj ni rajdis. Subite ni haltis kaj la gvidantoj diris, ke ni alvenis. La kameloj genuiĝis, kaj ni revenis al la solidaĵo, sed nur post kelka tempo ni povis normale piediri per niaj necertaj kruroj. La aliaj berberoj jam preparis la manĝaĵon: panon kaj marmeladon, kiujn ni manĝis per la fingroj el du grandaj teleroj.

Post la manĝo ni daŭre rajdis sur la kameloj dum eble du horoj. Kiam ni haltis, la berberoj ekpreparis la vespermanĝaĵon kaj niajn dormejojn. La dormejoj konsistis el la lankovriloj sur kiuj ni sidadis. Tiam ni lernis kiel oni faras la panon. Unue ili bruligis lignon, kaj kiam la karboj estis ankoraŭ varmaj, ili kovris ilin per iom da sablo. Sur tiun sablon ili metis la ankoraŭ nebakitan panon kaj sur la panon ankoraŭ pli da sablo. Super ĉio ili denove bruligis lignon.

La suno jam subiris, kaj dum ni atendis la bakitan panon, la berberoj dancis kaj kantis. Poste ili eljetis la ankoraŭ brulantan lignon kaj la sablon desur la pano. La pano estis preta por manĝi. Ni ĉiuj sidiĝis en granda rondo por manĝi la panon, marmeladon kaj kuskuson. Por trinki, ili preparis teon de mento. Ni manĝis ĉion nur per la fingroj, kaj trinkis la varmegan kaj dolĉan teon el glasoj. Tre lacaj, ni preparis nin por dormi sub la lankovrilaj tendoj: du por la ĉirkaŭ tri-dek turistoj kaj unu por la berberoj.

Matene ni trinkis la saman teon kaj manĝis la saman panon kun marmelado. Ni daŭrigis nian vojaĝon.

Antaŭ ol ni alvenis al nia celloko, en la tria tago, kelkaj el ni piediris anstataŭ rajdi. Kiam ni fine haltis, iu rimarkigis “Rigardu!” kaj fingromontris al granda anonctabulo, sur kiu legiĝis: “Timbaktu: 82 tagojn... per kamelo.”

John LEONARD (n. 1951)

kelkaj hajkoj

du spegul-lagoj
samsamaj nekonataj –
ambaŭ kirlas vent’

eĉ kanoseĝo
kliniĝas kvazaŭ ebria –
mondo delira

malaperemas
kvazaŭ lunradi’ – tamen
fortas araneaj’

klinas asfodel’
sian orkapon al mi –
kara flirtanto!

ombraj flugiloj
ekbrilas trans sunan deklivon
kuniklo kvietiĝas

gongo eksonas
inter okazintaĵoj
kaj okazontaj’

Tradukis Miko SLOPER

John T. DALE Jr. (n. 1946)

Al Ŝi

Ĉu decas ke nia sankta ĵuro
simple mortu en la tombo de l’ ĵuro?

Ĉu ne pli bone lerni el eraroj
kiel vivi kune kaj plenumiĝi per amfaroj?

Amo mia, tenu min je la mano
kaj kortenero estu nia ĉiutaga pano.



Gellu NAUM (n. 1915)

Vasco da Gama

– fragmento –

...
sed la papilioj batas la tamburojn ĉe stratrando
kaj la virino sin ĵetis per unu salto
en la larĝe malfermitan kapon de l’ statuo

ŝi provis flari la murojn
deskui de si la pensojn kiel insektojn sed
la insektoj rongis ŝiajn pensojn kiuj
estis kreskintaj ĉirkaŭ la statuo
en ĉi lokoj kie malantaŭ la vitro
la kandelo montris siajn krurojn dum vasco
provas la marfundon per fingro

kie vasco da gama ekflaras la gambojn
la gambojn de virinoj kun ŝtrumpligiloj
la gambojn de virinoj kun bariloj
la gambojn de virinoj kun medaliono
la gambojn de virinoj kun katedralo surnuke
la gambojn de virinoj kun vento sursine
la gambojn de virinoj kun gamboj surgambe
kaj kun aliaj gamboj sur tiuj ĉi gamboj

sed vasco da gama estas vojaĝanto
li flaras la akvon per lorno
liaj naztruoj plilongiĝas ĝis la marbordo
ĉar li manĝas ankaŭ la kapon de la stiristo

...

Tradukis Sasha VLAD
Poluris Ionel ONET

[Aliaj poemoj de la samaj aŭtoro kaj tradukintoj legeblas en *L’ ekzako de l’ ombro kaj Patro mia laca • L’ avantaĝo de l’ vertebroj* haveblaj de la libroservo de ELNA.]

Reg REID (n. 1952)

Vintraĵ, nudaj branĉoj

Sur vintraĵ, nudaj branĉoj
Birdoj ekbrilas dum sunsubiro
Kiel fornoj nutritaj de steloj.
Konstelaciojn voras noktohoroj.
Ĉiu sekundo ekbrilas
Kiel birdoj dum sunsubiro.

El Niño

dincerpellaĉielolfromtheskytdecielldetschêllazégbólhdałcelolausdemhimmelfdelcieloluitdehemelv
l o a i a c a d e a p a r e n t f ä r ä i n c e t a r e
a p l u v o f a l a d a s s ä j n e s e n ĉ e s e
h e r a i n i s f a l l i n g s e e m i n g l y c e a s e l e s s l y
a p l u i e t o m b e a p p a r e m m e n t s a n s c e s s e
a p l ö v g i a c r o u d a p a r a i n t a m a i n g s a i n z a r a f ü d a r
u l l a z e s Ő l á t s z ó l a g s z a k a d a t l a n
a p i o g g i a s t a c a d e n d o i n a p p a r e n z a s e n z a s m e t t e r e
ä l l t d e r r e g e n s c h e i n b a r u n a u f h a l t s a m
a l l u v i a c á e a p a r e n t e m e t e s i n c e s a r
a l t d e r e g e n s c h i j n b a a r o n o p h o u d e l i j k

Jonel ONEJ

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org.
U.S. Postage
PAID
Permit #1040
Leesburg, FL 34748

